



# monda solidareco

N-ro 85 - Julio 2005 - kvaronjara - 1.25 €

## Atentigo

Eksterkutime tiu-ĉi numero de Monda Solidareco ne similos al la aliaj. Meze de la kampanjo "Monda agado kontraŭ la mizero" al kiu Monda Solidareco kontraŭ la Malsato asociiĝis tra CEIP\*, ni elektis raporti pri ĝiaj esencaj aspektoj, lasante la parolon al ĝiaj agantoj mem, interalie tiuj de la franca platformo : "2005 : neniu plua ekskuzo". La informoj pri niaj projektoj iom suferas pro tio, sed ili reaperos kiel kutime ekde la numero 86. Dankon al ĉiuj pro via intereso.

La redakcio

## ENHAVO

U.N. post 60 jaroj ...	p.1
MSM vojiras ...	p.2
Afrikaj promenadoj	p.3-4
"Altermondes"	p.5
2005 : neniu plua ekskuzo	p.6
Porto Alegre	p.7
Malio konkuras	p.8

## Unuiĝinta Naciaro post 60 jaroj. Kia bilanco kaj kiuj reformoj ?

Vasta demando ! kaj ne vere simpla. La rigardo, kiun oni povas ĵeti sur la bilancon de UN ekde ĝia fondiĝo, povas esti aŭ treege kritikema, aŭ plene laŭdanta.

Kritikema, ĉar la organizaĵo naskita en 1945, kiu utilis kiel eŭoejo al la streĉoj de la malvarma milito kaj kiel tribuno al la movadoj por la sendependado de la kolonioj, multe maljuniĝis. Krome, tute ne ebliginte al la mondo fariĝi iom post iom tiu "miela valo" priskribita en la mitologio de la internaciaj funkciuloj - malpli da militoj, da malegalaĵoj, da poluado, pli da respekto de la homaj rajtoj, pli da justeco kaj da solidareco-, UN malebligis nek la eksplodon en Somalio, nek la genocidon en Ruando, nek la masakrojn en Bosnio, nek... ankoraŭ pli

malbone, la jaro 2003 estos suferinta pro la spektaklo de neeltenebla senefikeco de UN por respondi al la aktualaj defioj de nia mondo : la rezolucio 1441, kiu postulis inspektadojn en Irako, okazigis la plej akran batalon, kiun konis la Sekureca Konsilio ekde la fino de la malvarma milito, ilustrante la frontan kolizion de du ideologioj, tiu de la nacioj de unuflankismo kontraŭ la plurflankismon, kiu estas la esenco mem de UN.

Laŭdanta, ĉar por tiu, kiu observas la vivon de la planedo ekde la UN-fondiĝo en la sinsekvaj kunteksto de tiu forfluinta duonjarcento, la progresoj estis etpaŝe faritaj, malgraŭ la malfacilaj travivaĵoj suferitaj de la homaro ; la deziro juĝi la krimulojn trans la landlimoj fariĝis fakto konsentita de la komuna konscienco kaj trans la ŝaŭmanta aktualajo, de nun la konscienco pri la mondo kaj ties problematikoj estas integrita en la plimulto de la individuaj konsciencoj : tie komenciĝas civitaneco. Kaj tiu nevidebla maturiĝo de la konsciencoj ĉefe devenas de la ekzisto de UN, de ties filioj, organizaĵoj kaj internaciaj konferencoj dediĉitaj al la homaj rajtoj, krom la eksplodo de la komunikaj teknikoj ! Malantaŭ la ĉiam afliktega granda spektaklo de la politikaj kaj ideologiaj alfrontiĝoj je la nivelo de la Ĝenerala Asembleo kaj de la Sekureca Konsilio, la formika laborado de la teknikaj UN-organoj ebligis la unuajn homamasajn kunvenegojn de la civila socio okaze de la grandaj internaciaj konferencoj, naskontaj la alimondan penson, kiu komencis firmiĝi en Rio-de-Ĵaneiro en 1992.

kaj ĝuste tiu amasa evoluado de la konsciencoj igas antaŭvidebla la progresivan realigadon de la tutmondista utopio.

Fakte la anoncita reformo, kiu proponos en septembro la integradon de novaj konstantaj membroj en la Sekurecan Konsilion neniel povos solvi la demokratian mankon konstatitan kaj ĉiu espero de solvado de la problemoj riskas foriĝi.

Tial ni Globidaranoj, objektivaj opinias, ke la plej bona maniero por respondi al ĉiuj defioj estas la demokratigo de la UN-institucioj mem. Tiel tio nepre iras tra vera monda parlamento, kiu reprezentus la homojn, kaj ne la ŝtatojn. Tiu parlamento devus, post tempo, solvi la problemojn pri rajteco, dediĉante sin nur al la efektiva solvado de la nunaj problemoj, kiuj estas interalie la granda nefirmeco, kiun oni konstatas en sudo kiel en nordo.

Ĉu ankoraŭ tro frue ? Prie notu, ke nun la alimondista movado sin difinas mem kiel la heroldo de la "planedaj civitanoj". Ĉiel, al ni apartenas lanĉi tiun debaton al la publiko, ĉar nia specio mem estas en danĝero ; ĉiu supraĵa reformo restos senefika kaj riskas konduki denove al disvolviĝo de la ekstremistaj organizaĵoj, kiuj povas ŝanceli la nunajn nemultajn akiritaĵojn kaj puŝi la mondon en novajn aventurojn pli mortigajn ol la antaŭaj mondaj konfliktoj.

Hotto Abdoulaye, DD, AC.

Certe oni estas ankoraŭ tre malproksime de la celo,

# Monda Solidareco kontraŭ la Malsato : 23jara progresado

Kiam en 1998 la Administra Konsilantaro decidis kunvoki la unuan Mondan Federacian Asembleon por la jaro 2000, tiam procezo de elvolviĝo de niaj strukturoj estis komencita :

**F** 1999 : lanĉo de la balotelektoj de la Delegitoj en Eŭropo kaj en Okcidenta Afriko.

**F** 3an de februaro 2000 : balotelekto de la eŭropaj Delegitoj. Estis elektitaj : John De La CRUZ kaj Maurice TOURMETZ (eksiginta iom poste pro malsano).

**F** 3an kaj 4an de aŭgusto 2000 : Federacia Asembleo en Abomey-Calavi (Benino) kun la partopreno de 31 delegitoj de grupoj kaj de deko da observantoj. Elekto de tri provizoraj Okcidentafrikaj Delegitoj .

**F** 4a ĝis 7a de aŭgusto 2004 : la Ĝenerala okcidentafrika Asembleo okazinta en Vagaduguo (Burkinio) balotelektas du regionajn Delegitojn : Dramane TRAORE kaj René TCHIBENOU. Federacia Asembleo kaj Administra Konsilantaro sekvas samloke : nia organizaĵo ŝanĝas sian nomon al "Monda

Solidareco kontraŭ la Malsato" (MSM).

**F** 24a ĝis 26a de septembro 2004 : por validigi tiun nomŝanĝon en Eŭropo, la Administra Konsilantaro kunvenanta en Cahors decidis kunvoki Eksterordinaran Ĝeneralan Asembleon en decembro, kaj, per sama faro, komenci la reverkadon de ĉiuj statutaj kaj reglementaj tekstoj.

**F** 18an de decembro 2004 en Richelieu, Eksterordinara Ĝenerala Asembleo al kiu estis kunvokitaj la membroj vivantaj en Francio, adoptas la statuton de "Globidar-France" kiel ankreo de la transnacia organizaĵo MSM. Similaj statutoj povos esti faritaj en aliaj landoj laŭ la bezonoj.

**F** 6an de majo en Gemeaux, la Administra Konsilantaro adoptas la Mondan Federacian Reglamenton de MSM.

Adiaŭ al la provizoraj tekstoj verkitaj en 1982, 1983 kaj 1984 dum la lanĉo de Monda Fonduso de Solidareco Kontraŭ la Malsato. Nun lokon al la transnacia funkciado de la **federacio** "Monda Solidareco kontraŭ la Malsato".

## La plejbono el la tutmondismo

Kiuj estas la novaj strukturoj de MSM ?

Ø Ĉiuj membroj de MSM, la "Globidaranoj", kie ajn estas iliaj loĝlokoj, estas egalece inter si membroj de la transnacia mutuala asocio "Monda Solidareco kontraŭ la Malsato". Ilia partopreno kaj la funkciado de la mutuala asocio estas regulataj de la Monda federacia reglamento.


Ø La Globidaranoj elektas Regionajn Delegitojn po du el ĉiu monda regiono, por sesjara mandato. Nun du mondaj regionoj estas starigitaj : Eŭropo kaj Okcidenta Afriko. Du aliaj regionoj estas starigataj : Ekvatora Afriko kaj Meza Ameriko.

Ø La Regionaj Delegitoj partoprenas en la Federacia Administra Konsilantaro. Ĉi lasta konsistas almenaŭ el 10 membroj. Se la nombro de la Regionaj Delegitoj ne estas sufiĉa (nuna situacio), tiuj lastaj kunelektas la kompletigajn administrantojn por simila sesjara mandato.

Ø Interne de la Federacia Administra Konsilantaro ekzistas Federacia Estraro (simboligita per la dika nigra punkto). Renovigita ĉiun duan jaron, la Estraro nun konsistas el 4 membroj :

- Ä Federacia Sekretario : KUADJO Yaovi ;
- Ä du Federaciaj adjunktaĵaj Sekretarioj : Danièle CHARIER kaj John De La CRUZ ;
- Ä Federacia Kasisto : Daniel DURAND. La Federacia Kasisto regas rekte aŭ per perantoj, ĉiujn financajn kontojn de MSM en ĉiuj landoj (nun en Belgio, Francio, Nederlando, Togolando, Benino kaj Burkinio).

Ø La Regionoj povas havi unu aŭ plurajn landajn ankrejojn (lokaj aŭ landaj asocioj) ĉefe por ebligi la financon funkciadon de MSM. Tiuj asocioj ludas



kroman rolon ege gravan de reprezentado kaj de partoprenado en la civila socio. Ekzistas nun unu landa asocio en Francio ; alia estas konsistigata en Togolando.

Ø ekzistas ankaŭ du sendependaj lokaj asocioj : unu en centro de Francio "Globicentre" (v. Monda solidareco n ° 83) la alia en Kalonge (Sud-Kivuto, Kongio) (v. en tiu ĉi bulteno, paĝo 4.)

Ø Laŭ iniciato de la Regionaj Delegitoj, iu Ĝenerala Asembleo de landa asocio de MSM povas esti plivestigata en regionan Ĝeneralan Asembleon (Eŭropan, Okcidentafrikan, ..) kiel tiu, kiu okazis en Gemeaux la 7an de majo 2005.

Ø restas ankoraŭ kreota la "Monda Konsilio", kiu estos taskita plenumi arbitracian funkcion kaj estigi ligan inter MSM kaj la Kongreso de la Popoloj.

Daniel Durand

La Federacia Reglamento estas sendebila al ĉiuj globidaranoj, kiuj petos ĝin je la adreso de la bulteno aŭ per retroŝto al [info@globidar.org](mailto:info@globidar.org).



## Afrikaj promenadoj

*Ne, tie ĉi ne temas pri invito al libertempa turismo. Simple ni paŝumas tie, kie manifestiĝas tiuj, kiuj vivante en bezono, informas nin pri siaj projektoj. Ne vagadoj, sed antaŭanoncoj aŭ akompanoj de la solidareco. Tio ne ĉiam estas ripoziga, kiel tion oni taksos jene !*



### Urĝa helpo en Benino

En decembro 2004, gravaj inundoj draste suferigis tri Globidaranajn grupojn en la departemento Mono : "La Paco" en Agbozehoué, "Aïdjedo" en Kessoui, "Gbedjemissi" en Ahokian. Rikoltoj detruitaj, bestaro pereinta aŭ disigita, loĝejoj ruinigitaj, nutraj rezervoj detruitaj, moskitvualoj forportitaj... la rezulto estas afliktega.

Pro urĝeco, 2 administratoj de MSM sendis al ECIDAM, kiu kadras la grupojn, malgrandajn personajn donacojn, poste MSM destinis al ECIDAM monsumon de 1.901 Euroj, t.e. 1.252.878 CFA F por :

**1./ Urĝa prinutra helpo** : 180 000 CFA F por :

Ø aĉeto de tri sakoj de 100 kg de maizo po 35.000 CFA F. Sume 105.000 CFA F

Ø aĉeto de 6 sakoj de rizo po 12.500 CFA F. Sume 75.000 CFA F

**2./ aĉeto de sorbigitaj moskitvualoj** po 2.500 CFA F por 13 homoj = 32.500 CFA F

**3./ transportkosto** : 30.000 CFA F

Krome, MSM estis metinta 1.000.000 CFA F je la dispono de ECIDAM por aranĝi mikrokreditojn. El tiu monsumo ECIDAM pruntodonas 300.000 CFA F por :

Ø rekonsistigo de malgrandaj bredataroj (**kokinetoj, kapridoj**), t.e. po 50.000 CFA F por la tri grupoj :  
sume 150.000 CFA F

Ø elspezoj por **pretigi la kampajn laborojn** po 50.000 CFA F por la tri grupoj : sume 150.000 CFA F.

**alvoko !**

### veturilo por ECIDAM

ECIDAM, nia partnera NŜO en Benina sudo, trapasas gravajn financajn malfacilaĵojn, manke de monprovizantoj. Jam de unu jaro la animantoj ne plu disponas eĉ pri veturilo por iri al la vilaĝoj. Ili do devas elturniĝi per savan-taksioj, kio multe kostas, kaj ankoraŭ pli kiam necesas transporti materialon (kio okazis, kiam ili portis helpon al la ruiniĝintaj grupoj en Mono).

Se vi deziras donaci nenovan veturilon, jen por vi oportuno fari plian bonan agadon, donacante ĝin al ECIDAM. Necesas, ke la veturilo bone funkcii : la afrikaj tervojtoj kaj klimato estas malfacilaj ! kompreneble, kamioneto aŭ komerca veturilo estus idealaj, sed tio ne estas nepre necesa.

Si vi havas tiun eblecon, vi bonvolu informi nin je la bultena adreso !



### Mallonge el Togolando

La Grupo Agro-Paŝtista **Estonteco** en Lomeo, animata de S-ino Constance Akpaki, kiu instalas legomkulturejojn en Assome, apud la rivero Zio, akurate ĵus repagis la unuan pruntoparton, t.e. 358.431 CFA F (546,42 €). tio signifas, ke "Estonteco" bone instruiĝis per la lecionoj de sia malsukcesa unua kampanjo kaj ke la produktado estas nun pli bone programita kaj mastrata. Gratuloj !

## MONDA SOLIDARECO - KUNE AGADI

La asocio MONDA SOLIDARECO - KUNE AGADI (MSKA / SMAE) kunvenigis du Ĝeneralajn asembleojn la 5an de decembro 2004 kaj la 30an de januaro 2005 sub la prezidanteco de BISIMWA Aimé RUZUBA.

SMAE kreita en 2001 agadas kiel "**korespondanto**" de MSM en Sud-Kivuto. La asocio agadas ankaŭ pri alfabetigo, kudrado, instruado de Esperanto kaj edukado al civitismo enkluzivante la mondan civitanecon. Krome SMAE elvolvas plurajn iniciatojn tiajn, kia la kreado de ŝparkaso. La regiona radiado estas plenumita de reto da membroj dividitaj laŭ "aksoj" : Kavumu, kie la asocio disponas pri lokalo, Bukavu, Kamanyola, Mwenga, Uvira, sed ankaŭ Goma (provinco Nord-Kivuto) kaj Kindu (provinco Maniemo). En decembro estis adoptita trijara programo da aktiveco por aferoj ligitaj ĉefe al evoluo kaj al la plifortigo de la solidareco.

« Ni volas unue demonstri, ke en la nuna kunteksto la solidareco estas klopodo nepre sukcesonta. **MONDA SOLIDARECO KONTRAŬ LA MALSATO** jam nun ludas gravan rolon en la memhela sistemo.

Sed necesas favorigi taŭgajn laborkondiĉojn, por ke ĉies sindevontigo ebligu efektivan aplikigon de tiu memhela sistemo, kiu estas la sola rimedo por alporti daŭran solvon al daŭra evoluo. Tial ni ĝojas ankaŭ povi kune diskuti pri la memhela politiko. Fine ni opinias, ke la partopreno de ĉiuj, kiuj laboras por la bonfarto de la homaro necesas dum tiu firmiga fazo.

Ni volas labori tiamaniere, ke instaliĝu solida fundamento por la elvolviĝo de la mutualistaj asocioj en diversaj regionoj de la Demokrata Respubliko Kongio ... »

*SMAE, Butwashenge, Kalonge, Sud-Kivu, Congo R.D.  
ou BP 470 Cyangugu Rwanda.*



### Lastminuta informo

Kun granda konsterniĝo mi sciigas al vi la masakron de loĝantaroj, kiu ĵus estis farita en la teritorio de Kalonge, grupo de Fendula en la vilaĝo de Mamba fare de la Ruandaj Hutu-ribeluloj el la Demokratika Fronto por la Liberigo de Ruando (FDLR), asociitaj al la ribelaj grupoj nomitaj "Rasta".

Laŭ iu elsaviĝinto tiuj masakroj estas reprezalioj de tiuj armitaj grupoj, ĉar la enloĝantaro kunlaboris kun soldatoj de la landaj armeaj fortoj kaj kun la soldataroj de la Misio de Unuiĝinta Naciaro en Kongio (« MONUC »), kiuj komencis operaciojn de informado de ĉiuj eksterlandaj milicioj pri ilia rehejmiĝo. Se tiuj milicioj rezistus al la memvola rehejmiĝo, ili estus trudpelitaj al tio. Laŭ la elsaviĝintoj, 35 homoj estis bruligitaj vivantaj enfermite en domo, kaj pluraj aliaj estis vunditaj kaj ricevas zorgojn en la flegejo de Cifunzi, en Kalonge mem.

Jen kion ni ĵus travivis en la monda komunumo Kalonge.

Mi informos vin laŭmezure, ĉar inter la komunumo de Kalonge kaj la urbocentro ankoraŭ ne ekzistas telefona komunikado.

Sincera kunlaborado

*Corneille Marizika, mondciivitano (karto : 183.883)*

Corneille Masirika estas la prezidanto de la Mondciivitana Registrocentro en Kalonge. Li estas ankaŭ membro de MSM kaj esperantisto. Jam li, pasintjare, alarmigis nin pro la arestado de 9 mondciivitanoj, liberigitaj iom poste.

DD.

### Mallongigoj de la sekvontaj paĝoj :

IMF Internacia Mona Fonduso  
MOK Monda Organizaĵo pri Komerco  
ILO Internacia Labor-Organizaĵo  
UN Unuiĝinta Naciaro (aŭ Unuiĝintaj Nacioj)  
CEIP Centro por Esplorado kaj Informado pri la Progreso (Francio/CRID)

**Enhavo de Altermondes n° 2** (junio-aŭgusto 2005) :  
(bulteno nur franclingva)



- Ä **Pedagogia dosiero** el 16 paĝoj pri la temo "Migradoj kaj Elvolviĝo" partnerece kun la kampanjo "Morgaŭ la mondo ... la migradoj por vivi kune". Kio estas la realeco de la migradoj ? Ĉu la aranĝitaj politikoj respektas la rajtojn de la migrantoj ? Kiun rolon havas la migradoj en la procezoj de elvolviĝo ? Atestoj kaj proponoj el organizaĵoj en nordo kaj en sudo.
- Ä **Analizoj** pri la freŝdata maskerada balotelekto en Togolando, pri la intereso de Eŭropo por la Romaoj, pri la demokrata transiro en Demokrata Respubliko Kongio, pri la batalo pri la ekonomiaj, socialaj kaj kulturaj rajtoj, ktp.
- Ä **La vidpunkto** de tri organizaĵoj (el Malio, Senegalio kaj Britio) pri la promesoj faritaj al Afriko okaze de la kunveno nomita G8.
- Ä **La prezentado** de alternativaj praktikoj : tiun ĉi monaton, la solidara financo.
- Ä Kaj konstante, la **aktualajo de la NŜO** je la internacia, landa kaj loka niveloj, atestoj, portretoj kaj kulturaj paĝoj.

*Kaj ni ne rezistas al la plezuro reprodukti ĉi tie la eldonartikolon de Bernard Salamand, prezidanto de la reto RITIMO, kiu ŝajnas al ni modela konduto de transpaso de la politikaj skismoj je la nomo de supera kolektiva intereso. Tio, trans la okaza objekto mem de la franca referendumo.*

## Ĉiel « *alieŭropistoj* »

Kiom multaj definitivaj verdiktoj kaj ĉiaspecaj akuzoj lanĉitaj el ambaŭ flankoj de la demarkacilinio inter jes kaj ne al la eŭropa konstitucia traktato en la amaskomunikiloj, en la hejmoj kaj ĝis la sino de niaj asocioj kaj movadoj !

Periodo da foje fruktudonaj interŝanĝoj, tiu referendumo kampanjo povintus okazi multe pli senpasio. Ĉar, finfine, la maniĥismo de la farita demando devigis ĉiun el ni, en la progresemaĵoj, sin deklari laŭ la malplej malbona el la proponitaj rezignoj. Ĉu konvenis riski daŭre malaltigi la standardon de la kontraŭstaro al la liberala dogmo balotante jes kun la plej arogantaj poruloj de la forpelo eĉ de la ideo pri sociala normo ? Aŭ ĉu konvenis riski daŭre bloki la aspiron al frata eŭropa komuneco, asimiliĝinte kun la "ne", al la fridotimaj kaj faŝismemaj naciistoj ?

Inter pesto aŭ ĥolero, ĉiu do elektis sian malplej malbonan, foje kun decidemo, sed malofte kun entuziasmo.

Kaj la rezultato finfine nenion ŝanĝas por ni ! Eŭropo paca, akceptema, garantianto de la civilaj, ekonomiaj, socialaj kaj kulturaj rajtoj sur sia teritorio, aktiva por antaŭenpuŝi ekstere, motoro de la daŭra disvolviĝo je monda skalo, Eŭropo al kiu ni aspiras, ĉiel restas konstruota.

Nun ni scias, ke ekde la franca "ne" ni devos antaŭeniri al tiu "Alia Eŭropo". Oni estas libera opinii, ke la tasko estus pli facila, se la "jes" estus gajninta. La nuna grava afero, kion ajn oni balotis, estas nur la volo konverĝi por pli bone esperi. Nu, relokigu la argumentojn kaj insultojn, la kampanjo estas finita kaj kun ĝi la dialektika amuziĝo. Ni havas laboron !

*Bernard Salamand (RITIMO) (kun permesilo)*

Monda agado kontraŭ la mizero,

# **2005 : neniŭ plua ekskuzo !**

## Rezultatoj post kelkaj monatoj

Ekde januaro, la monda civila socio sin mobilizas por admoni la ŝtatojn fari konkretajn decidojn pri lukto kontraŭ la mizero en la mondo. Kelkajn monatojn poste : unuaj rezultatoj ...

**"2005 : neniŭ plua ekskuzo"** : unuafoje en Francio tiel larĝa koalicio da asocioj kaj sindikatoj asociiĝas pri aferoj de internacia solidareco. Kun la Monda Agado kontraŭ la Mizero, ili estas miloj da organizaĵoj kaj milionoj da civitanoj, kiuj mobiliziĝas tra la mondo admonante la politikajn responsantojn por ke la imperativoj de libereco kaj de digneco de la homoj kaj popoloj superu la logikojn de profito kaj de kresko.

Premtrudante al la decidantoj, tiu movado jam havigis al si kelkajn gajnojn el la regantoj de la riĉaj landoj. Ni estas ankoraŭ malproksime de la celo, sed tio ĉi estas certa : sen la civitana premtrudado, neniam tiuj decidoj estus faritaj. :

**Je la Eŭropa nivelo**, la 24an de majo 2005 en Bruselo : Eŭropa Unio sin devontigis altigi sian nivelon de helpo al disvolviĝo al averaĝe 0,56 % en 2010, post 0,7 % en 2015. La evento organizita dum la mateno mem de Monda Agado kontraŭ la Mizero, en ĉeesto de la ministroj de la elvolviĝo de Eŭropa Unio, ŝajne decidige efikis sur la traktadojn. Tiu decido premtrudas sur Kanadon, Japanion kaj Usonon kelkajn semajnojn antaŭ la kunveno nomita G7. Ĝi signifas la alporton, ĝis 5 jaroj, de pliaj 25 miliardoj de eŭroj ĉiun jaron por la publika helpo al elvolviĝo. La kampanjo pledas por ke Eŭropa Unio kolektive atingu 0,7 % ĝis 2010 kaj Francio ekde 2007.



La 17an de junio 2005 en Luksemburgo, la Eŭropa Konsilio instigis la ministrojn pri financoj aranĝi la skizon de eŭropa imposto pri la flugbiletoj.

**Je la internacia nivelo**, la 11an de junio 2005 en Londono : la ministroj pri financoj de G8 anoncas la nuligon de la plurflanka ŝuldo (ŝuldita al IMF, al Monda Banko kaj al la Afrika Banko por Disvolviĝo) de 18 tre malriĉaj landoj, por sumo de 40 miliardoj da dolaroj. La kampanjo postulas la pliampleksigon de tiu nuligo al ĉiuj ŝuldoj de la koncernataj landoj kaj al ĉiuj landoj (pli ol 60) por kiuj la repago de la ŝuldo estas obstaklo al kontentigo de la fundamentaj rajtoj. Krome estas necesege certiĝi, ke tiuj nuligoj ne estos financitaj per dekalkulo el la buĝetoj de la publika helpo al disvolviĝo de la G8-landoj.

**Je la franca nivelo**, 8an de aprilo 2005 : sekve de la alparolo de la kampanjo kaj la prezentado de siaj proponoj pri la afero de la fiskaj paradizoj, la registaro sin devontigis transdoni tiun zorgon okaze de la debato pri la Jarmila Celaro de Unuiĝinta Naciaro.

En Nacia Asembleo kaj en Senato, multaj parlamentanoj el ĉiuj politikaj tendencoj interesiĝas pri nia propono de bilanca proceduro pri la francaj kreditoj al la sudaj landoj. Kelkaj ankaŭ sin devontigis postuli, ke kelkaj nuligoj (kiuj rezultas de la politiko de subteno al la francaj eksportaĵoj) estu ekskluditaj de la helpo al disvolviĝo.

*2005 neniŭ plua ekskuzo.*

<http://www.2005plusdexcuses.org>

---

La ekbaton de la monda kampanjo kontraŭ la mizero donis la **Monda sociala forumo de Porto Alegre**. Tiu forumo, mirinde sukcesinta pro sia organizmaniero, pro sia homalfluo, kaj pro siaj laboroj, markas stadion de maturiĝo de la socialaj forumoj. Aparte la proponoj anstataŭis la denuncadon kaj analizadon de la antaŭaj forumoj : tio estas saĝa progreso.

Ĝi restos en la memoro de la publiko per la manifesto kaj la **12 proponoj lanĉitaj** de 19 internacie famaj homoj, mem tre ligitaj al la mondaj socialaj forumoj. :

Ekde la unua Monda sociala forumo okazinta en Porto Alegre en januaro 2001, la fenomeno de la socialaj forumoj etendiĝis al ĉiuj kontinentoj, kaj ĝis la landaj kaj lokaj niveloj. Ĝi aperigis planedan publikan spacon de civitaneco kaj de luktoj. Ĝi ebligis ellabori proponojn de politikaj alternativoj al la tiraneco de la novliberalisma tutmondiĝo impulsita de la financaj merkatoj kaj la transnaciaj societoj, kaj kies armitan brakon konstituas la imperia povo de Usono. Pro sia diverseco kaj la solidareco inter la agantoj kaj la socialaj movadoj, kiuj konsistigas ĝin, la alimondista movado estas

nun forto, kiu mondnivele gravas.

El la lavango da proponoj devenantaj de la forumoj, multnombraj ŝajnas ricevi tre ampleksan konsenton sine de la socialaj movadoj. Inter ili la subskribintoj de la Manifesto de Porto Alegre, **kiuj sin esprimas je sia propra nomo kaj tute ne pretendas paroli je la nomo de la forumo**, refliefigis dekdu kiuj kune entenas sencon kaj projekton por la konstruado de alia ebla mondo. Se ili estus aplikitaj, ili permesus al la civitanoj finfine komenci realproprigi al si sian estontecon.

La minimuma bazo estas submetita je la takso de la socialaj agantoj kaj movadoj el ĉiuj landoj. Al ili apartenas je ĉiuj niveloj - monda, kontinenta, landa kaj loka, fari la necesajn batalojn por ke ili fariĝu realeco. Fakte ni havas nenium iluzion pri la reala volo de la registaroj kaj de la internaciaj institucioj spontanee apliki tiujn proponojn, eĉ kiam pro pura oportunisto ili pruntas iliajn vortojn.

**I. Alia ebla mondo devas respekti la rajton de vivo por ĉiuj homoj dank'al novaj reguloj de ekonomio. Necesas do :**

1. Nuligi la publikan ŝuldon de la sudaj landoj, kiu jam estis plurfoje pagita, kaj kiu konstituas por la pruntodonintaj ŝtatoj, financaj establoj kaj internaciaj financaj institucioj plej taŭgan rimedon meti la plej grandan parton de la homaro sub sian regecon kaj daŭrigi ĝian mizeron. Tiu mezuro devas esti akompanata de la redono al la popoloj de la gigantaj monsumoj, kiujn forŝtelis iliaj koruptitaj regantoj.
2. Aranĝi internaciajn impostojn sur la financajn transakciojn (aparte la Tobin-imposto pri la deviza spekulacio), sur la rektajn investojn eksterlanden, sur la firmigitajn profitojn de la transnaciaj societoj, sur la vendadojn de armiloj kaj sur la aktivecojn kun fortaj ellasoj de vitrejekaj gasoj. Aldone al la publika helpo al disvolviĝo, kiu nepre devas atingi 0,7 % de la interna kruda produkto de la riĉaj landoj, la tiel eligitaj monfontoj devas esti utiligitaj por lukti kontraŭ la grandaj pandemioj\* (el kiuj AIDS) kaj por certigi la aliron de la tuta homaro al trinkakvo, al loĝejo, al energio, al sanservoj, al flegado kaj medikamentoj, al edukado kaj al socialaj servoj.
3. Iom post iom malkonstrui ĉiajn fiskajn, kriminalajn kaj bankajn paradizojn, kiuj estas tiom da rifuĝejoj de organizita krimo, de koruptado, de ĉiuspecaj trafikoj, de fraŭdo kaj de impostevitado, de deliktaj operacioj de la grandaj firmaoj kaj eĉ de registaroj. Tiuj fiskaj paradizoj ne reduktiĝas al kelkaj ŝtatoj konstituitaj kiel eksterjuraj areoj ; ili entenas ankaŭ la leĝarojn de kelkaj evoluintaj landoj. En unua tempo, konvenas forte imposti la kapitalajn fluojn kiuj eniras en tiujn paradizojn aŭ kiuj eliras, same kiel la establojn kaj financajn kaj alispecajn agantojn, kiu ebligas tiujn grandskalajn malversaciojn.
4. Fari el la rajto de ĉiu planeda loĝanto pri dungigo, pri sociala protektado kaj pri emeriteco, kaj respektante la interseksan egalecon, imperativon de la publikaj politikoj, kaj landaj kaj internaciaj.
5. Antaŭenpuŝi ĉiujn formojn de ĝusta komerco rifuzante la liberkomercajn regulojn de MOK kaj aranĝante mekanismojn, kiuj ebligas, en la proceso de produktado de havaĵoj kaj servoj, iom post iom ĝeneraligi la plej altajn socialajn (tiajn, kiaj enskribitaj en la konvencio de ILO) kaj mediajn normojn. Ekskludi edukadon, sanon, socialajn servojn kaj kulturon el la kampo de aplikado de la Ĝenerala Internkonsento pri Komerco kaj Servoj de MOK.

La konvencio pri la kultura diverseco nun traktata en UNESKO devas eksplicite superigi la rajton pri kulturo kaj pri la publikaj politikoj de subteno al kulturo super la komerca juro.

6. Garantii la rajton al prinutraj suvereneco kaj sekureco de ĉiu lando aŭ landaro per la antaŭenpuŝo de la kamparana agrikulturo. Tio devas estigi tutan nuligon de la subvencioj por eksportado de la agrikulturaj produktoj, unue de Usono kaj de Eŭropa Unio, kaj la eblecon imposti la importaĵojn por malpermesi la dumpingajn praktikojn. Same ĉiu lando aŭ landaro devas povi suverene decidi malpermesi la produktadon kaj la importadon de genetike modifitaj organismoj destinitaj al la nutrado.
7. Malpermesi ĉiun formon de patentado de la konoj kaj de la vivmaterialo (homa, animala kaj vegetala) kaj ankaŭ ĉiun privatigon de la komunaj havaĵoj de la homaro, kiel akvo.

**II.- Alia ebla mondo devas antaŭenpuŝi la arton kunvivi en paco kaj justeco je homara skalo. Necesas do :**

8. Lukti unue per la diversaj publikaj politikoj kontraŭ ĉiuj formoj de diskriminacio, seksismo, ksenofobio, kaj rasismo. Plene agnoski la politikajn, kulturajn kaj ekonomiajn rajtojn (inkluzive de la mastrado de siaj propraj riĉofontoj) de la indiĝenaj popoloj.
9. Fari urĝajn decidojn por ĉesigi la disrabadon de la medio kaj la minacon de la plej grandaj klimataj ŝanĝiĝoj kaŭzita pro la vitreja efiko kaj rezultanta unue el la multobliĝo de la transportoj kaj pro la malŝparado de la nerenovigeblaj energioj. Postuli la aplikadon de la ekzistantaj interkonsentoj, konvencioj kaj traktatoj, eĉ se ili ne sufiĉas. Ekapliki alian disvolviĝan manieron fonditan sur energia sobereco kaj sur demokrata mastrado de la naturaj riĉofontoj, interale de trinkebla akvo, planedskale.
10. Postuli la malkonstruadon de la armeaj bazoj de la landoj, kiuj posedas da ili ekster siaj landlimoj, kaj la retreton de ĉiuj eksterlandaj trupoj, krom specifaj mandatoj de UN. Tio validas unue por Irako kaj Palestino.

**III.- Alia ebla mondo devas antaŭenpuŝi demokration de loko al globo. Necesas do :**

11. Garantii la rajton informiĝi kaj la rajton informi la civitanojn per leĝaro :
  - F aĉesiganta la koncentriĝon de la amaskomunikiloj en la gigantajn komunikajn trustojn ;
  - F garantianta la memstarecon de la ĵurnalistoj rilate al la akciuloj ;
  - F favoriganta la senprofitcelan gazetaron, interalie la alternativajn kaj komunumajn mediatojn.

La respekto de tiuj rajtoj necesigas la starigon de civitanaĵo kontraŭpovo, aparte sub la formo de landaj kaj internaciaj observatorioj de la komunikiloj.

12. Profunde reformi kaj demokratigi la internaciajn organizaĵojn kaj superigi en ili la homajn, ekonomiajn, socialajn kaj kulturajn rajtojn, kiel sekvon de la Universala deklaro de la homaj rajtoj. Tiu unuarangeco necesigas la integradon de la Monda Banko, de IMF kaj de MOK en la sistemon kaj la decidigajn mekanismojn de UN. Okaze de daŭreco de la malobservadoj de la internacia leĝeco fare de Usono, necesos transloki la sidejon de Unuiĝinta Naciaro ekster Novjorko, en alian landon preferinde sudan.

*Porto Alegre, 29 janvier 2005 ; Tariq Ali (Pakistano), Samir Amin (Egiptio), Walden Bello (Filipinaj insuloj), Frei Betto (Brazilo), Atilio Boron (Argentino), Bernard Cassen (Francio), Eduardo Galeano (Urugujo), François Houtart (Belgio), Armand Mattelart (Belgio), Adolfo Pérez Esquivel (Argentino), Riccardo Petrella (Italio), Ignacio Ramonet (Hispanio), Samuel Ruiz Garcia (Meksikio), Emir Sader (Brazilo), José Saramago (Portugalio), Roberto Savio (Italio), Boaventura de Sousa Santos (Portugalio), Aminata Traoré (Malio), Immanuel Wallerstein (Usono).*

\* pandemio (ne en PIV) : infekta konstanta malsano, trafanta multajn individuojn tra la tuta mondo.

# Malio kunkuras

Kaj dume, fronte al G8, kiu ĉiufoje eltrovas legitimecon, kiun ĝi ne povas havi, la Forumo de la Popoloj aŭdigas sin en Malio :

Kiam ĝuste la ŝtatestroj de G8 komencas sian kunvenon en Glanaegles (Skotlando) kun Afriko unuarange entagordigita, la socialaj movadoj kaj organizaĵoj de la okcidentafrika civila socio rendezuis en Fana (Malio), firme decidinte ne lasi sian voĉon konfiskita.

Pli ol 1200 homoj, plimulte devenantaj de Malio sed ankaŭ de Benino, Burkinio, Eburio, Ganao, Gvineo, Niĝero, Centrafriko, Kongio, Senegalio, Togolando... partoprenas de la 6a ĝis la 9a de julio en tiu afrika kontraŭkonferenco de G8, popola kaj kamparana mobiliziĝo iniciatita de la Koalicio Alternativoj Afrikaj ŝuldo kaj Disvolviĝo (KAD Malio)

" Tiu ŝtatestroj de la plej riĉaj landoj en la mondo pretendas en siaj paroladoj labori por la evoluado de Afriko, sed fakte ili intertraktadas pri la konkurenco de niaj ekonomioj kun la nordaj merkatoj far siaj liberkomercaj politikoj" deklaris Aminata Toure Barry, prezidantino de KAD-Malio dum malfermo de tiu kvara "Forumo de la popoloj".

En la programo multeco da laborkunvenoj kaj da diskutoj, de kiuj ekaperas du fortaj zorgoj por la popoloj de la regiono : la liberigo de la kotona fakaro, kiu minacas rekte du milionojn da homoj nur en Malio, kaj la dramaj konsekvencoj de la privatigo de la bazaj socialaj servoj (sano, edukado, transporto, elektro, ktp.).

"Tiu kvara Forumo de la popoloj disetendiĝos, mi certas pri tio, en nia lukto kontraŭ la sociala, ekonomia, media, kultura kaj politika ruiniĝo" certigis Alou Diarra, regiona Prefekto. Granda protesta marŝo kontraŭ la anoncita privatigo de la Malia kompanio de disvolvado de la teksaj fibroj (CMDT) kaj kontraŭ la enkonduko de la genetike modifitaj organismoj fermos tiun eventon, sabate la 9an de julio.

Anne Marchand - Attac-Francio ( Grupo Afriko)  
David Eloy - CEIP - Altermondos.



## GLOBIDAR en Esperanta lando

Pro invito de Jean-Louis Gayet, Monda Solidareco kontraŭ la Malsato ĉeestis la centjariĝon de la Esperanto-klubo de Bourg-en-Bresse (Francio) solenita okaze de la jara kongreso de la Rodanalpa Esperanto-Federacio (Aprilo 2005). La invito celis partoprenon en ronda tablo pri la temo *komunikado kaj solidareco*. Krom Daniel Durand, kiu reprezentis MSM, ankaŭ partoprenis S-ino Boisson, kiu reprezentis Internacian Amnestion, kaj la fama tradukisto kaj verkisto Claude Piron. Ĉeestis pli ol 140 homoj inter kiuj kelkaj el Svisio, Italio kaj Germanio. La diskuto estis vigla kaj interesa, sed oni povas konkludi, ke nur duono de la temo estis traktita : la intervenoj kaj demandoj de la partoprenantaro temis ĉefe pri la komunikado, pri la avantaĝoj (realaj) de Esperanto, sed ne pri la supozeble pozitiva efiko de tiel bona komunikrimedo sur la praktikon de transnacia solidareco je la servo de planedaj loĝantoj.

Tamen, en apuda ĉambrego dum du tagoj estis starigitaj stando kaj la Globidaraj paneloj de Monda Solidareco, kaj tio montrigis bona okazo por interesaj kontaktoj inter la kongresanoj kaj la reprezentantoj de deko da humanaj organizaĵoj, lokaj kaj transnaciaj.

Globidar  
Heroldo de Monda Solidareco  
(Glob-id-ar-o)

## monda solidareco

Estas bulteno eldonita de **MONDA SOLIDARECO KONTRAŬ LA MALSATO**

### POR DISKONIGI MONDAN SOLIDARECON KAJ TIES BULTENON, VI POVAS MENDI :

ÄAliĝilojn (senpage)

Äblankajn ĉemizetojn 20 €

kaj blankajn trikotĉemizetojn 15 €  
kun emblemo de Monda Solidareco.  
Ĉiuj mezuroj. + afranko : 3 €  
(nur al Eŭropo)

Äkovertojn kun la frazo :

**La tero nutrus ĉiujn homojn  
se ĉiu solidare agadus**

100 por 6,80 € + sendkostoj: 3 €  
(Ekzistas ankaŭ en franca lingvo)

Ämemglumarkojn (1 €)

Äfotojn (prunto aŭ aĉeto) : projektoj en  
Burkinio, Benino, Kamerunio,  
Togolando, Ruando, Kongio

Ämultajn aliajn dokumentojn.

La nova materialo kun la nomo **Monda Solidareco kontraŭ la Malsato** estos disponebla dum la jaro 2005

### KOTIZOJ - DONACOJ - ABONOJ - MENDOJ : Kiel pagi ?

Äper franca ĉeko al Globidar

Äper poŝtaj rimedoj, je la nomo de :

**SMF- MONDA SOLIDARECO**  
(PĈK-CCP PARIS 10.734.96 Z)

RIP : FR 57 30041 00001 1073496Z020 31

Äper novaj poŝtmarkoj kiel eble sufiĉe  
diversaj, ankaŭ per monbiletoj enŝovitaj  
en ordinaran koverton.

ÄFEL kaj UEA kontoj : **mfsk-g**

Librotenado je la  
sama adreso kiel la bulteno

Sur la adresetikedo de la koverto aperas la proksimuma dato de via lasta financa partopreno. (situacio je la **4an de aŭgusto 2005**). Tiel ni esperas eviti la poŝtajn elspezojn por rememorigoj.

### RICEVITAJ KOTIZOJ kaj DONACOJ

Marto 2005 :	1 088 €
Aprilo 2005 :	2 566 €
Majo 2005 :	1 480 €
Junio 2005 :	1 405 €

MONDA SOLIDARECO estas eldonita en Esperanto, kaj franca lingvoj.

**Jara abono : 5 €**

**Redakcia komitato** : Alain Bal, Alain Cavelier,  
Danièle Charier, Daniel et Otilie Durand, Hotto Abdoulaye,  
Bernard Muet.

**Fotoj** el la fototeko de MSM

Elfrancisgis Daniel Durand,  
Kontrolis Sabine Hauge

Directeur de la publication : Daniel Durand  
CPPAP n° 0410 G 86482.  
Imprimerie de l'association.  
Tel : +33 (0)241 78 47 75

info@globidar.org

<http://www.globidar.org>

**MONDA SOLIDARECO**

**Les Nids**

**FR 49190 St-AUBIN-DE-LUIGNE**  
Francio